A. M i l d w u r f, kaj de la subskribinto pri *„Mono, Klasbatalo, Demokratio”* (en kiu artikolo oni legu sur p. 49 *arbitron* anstataŭ *arbitracion,* sur p. 50 *memprovizado* anst. *improvizado,* kaj sur p. 53 anstataŭigu dekfoje la radikon *lik-* per *likid-*). Krome estas du poemoj: *„Miaj amikoj”* de Mileuko J e v t o v i ĉ en traduko de Slavo S i m u n i c, kaj *„Edukado”* de Marjorie B o u l t o n. — W. P. R.

061.22 I.S.A.E.

## INFORMOJ DE I.S.A.E.

### Demisio de la sekretario-kasisto

Pro troa okupiteco mi jam delonge ne povis en ordo fari la taskojn de la sekretario-kasisto de ISAE. Definitive mi devis pro tio demisii kaj transdoni la laboron al la ĝenerala sekretario, kiu konsentis gvidi la aferojn ĝis nova elekto de la Estraro. Al ĉiuj kunlaborantoj mi kore dankas. — D-ro D. Brkiĉ.

### Novaj donacoj al la fondaĵo „Scienco”

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| C. A. ten Seldam, Nederlando ...... | sv.kr. | 40.— | = | steloj | 114.— |
| A. Ploussu, Grenoble, Francujo ... | fr.fr. | 1000.— | = | steloj | 40.— |
| F. Epstein, Hamburg, Germanujo | g.m. | 20.— | = | steloj | 73.— |
| La sumo el la unua listo | | | | steloj | 1237.— |
| entute | | | | steloj | 1464.— |

Al la donacintoj koran dankon! La donacojn sendu al s-ro inĝ. S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16 n.b. Johanneshov, Svedujo, poŝtĝiro 190976 (senpere aŭ pere de la landaj delegitoj).

### Esperanto-sekcioj en Domoj de scienculoj

En Domoj de scienculoj en *Leningrad* kaj *Gorkij* (Sovetunio) estas fonditaj Esperanto-sekcioj, kiuj vigle laboras, precipe tiu en Leningrad, kiu organizas ankaŭ publikajn kunvenojn por ĉiuj scienculoj. Unu el la rezultoj estas ke la aliĝoj al ISAE ekvenis.

### Invito al la kunvenoj de ISAE en Mainz

Dum la U.K. en Mainz okazos la jarkunveno de ISAE. Krom la regulaj punktoj (la raportoj kun la diskutoj pri ili, la absolvo de la Estraro, kotizo por 1959), la jarkunveno pridiskutos la problemon de la oficiala organo de ISAE kaj la laboron de la Terminologia sekcio (en kunligo kun la problemo de la redaktado de scienc-teknika parto de *Plena Ilustrita Vortaro*).

La dua kunveno pritraktos la eblojn de eldonado de Popularscienca biblioteko. Sugestoj kaj opinioj dezirindaj! — B. Popoviĉ.


## ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ

*de D-ro Paul NEERGAARD*

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, krome membro de la Akademio de Esperanto

*La unua libro aperinta en Esperanto:*

*pri* ĜARDENKULTURO, *pri* PLANTMALSANOJ, *pri* INSEKTOJ, *pri* DAMAĜAJ FUNGOJ.

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro

**entute enhavas 160 bildojn!**

**Belege tuttole bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.**

Prezo £ 1, afranko 9p.

Eldonita de
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO
Mendebla ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo,
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

---

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto:*

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de “Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” ...... La libro estas perfekta kiel presaĵo, ĝia lingvo estas senerara. Ĝuebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Ĉefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Svedujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen:*

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran fakl ibron ...... Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.